WIKIPEDIA

Valona lingvo

La Valona, (ISO-kodoj ISO 639-2: *wln* kaj 639-1 : *wa*) estas latinida lingvo parolata en Valonio, en la nordo de Francio kaj en partoj de Luksemburgo. Ĝi apartenas al la lingvoj de oïl, kies plej eminenta membro estas la franca lingvo, sed la valona ne estu konfuzita kun la Belga Franca, kiu malsamas de la Franca parolata en Francio sole en iuj negravaj punktoj de vortenhavo, ortografio kaj prononco. En Valonio la valona lingvo estas oficiala rekonita kiel regiona lingvo.

Enhavo

Regiono

Dialektoj

Aspekto

- Lingvofamilio
- Fonetiko kaj fonologio
- Morfologio
- Vortaro
- Sintakso
- Ortografio

Literaturo

Esperanto

Specimeno: la Patro Nia

Vidu ankaŭ

Eksteraj ligiloj

Referencoj

Regiono

La valona estas aŭ estis parolata ne nur en Valonio, sed ankaŭ en la jenaj regionoj:

- en parteto de Francio: *«botte de Givet»* (Givet-boto) (norde de departemento Ardennes), plus kelkaj vilaĝoj de departemento Nord (Cousolre);
- en parteto de la usona ŝtato Wisconsin (Green Bay), pro ampleksa enmigrado en la 19-a jarcento
- de loĝantoj de la urbo Bruselo
- en du aŭ tri vilaĝoj en Luksemburgo (Doncols, Sonlez), kie la valona estas nun verŝajne mortinta.

Dialektoj

La valona lingvo dispartiĝas en kvar dialektoj:

- Centra, parolata en Namuro *(Nameur)*, la ĉefurbo de Valonio, kaj en la urboj Wavre *(Åve)* kaj Dinant
- Orienta - multrilate la plej konservativa kaj idiosinkrazia de la dialektoj - parolata en Lieĝo (*Lidje)*, Verviers *(Vervî)*, Malmedy *(Måmdi)*, Huy *(Hu)* kaj Waremme *(Wareme)*
- Okcidenta - la dialekto plej proksima al Franca konvena kaj kun forta pikarda influo - parolato en Charleroi *(Tchårlerwè)*, Nivelles *(Nivele)*, kaj Philippeville *(Flipvile)*
- Suda - apud la Lotaringia lingvo kaj malpli apud la Ĉampanja lingvo - parolata en Bastogne, Marche-en-Famenne *(Måtche-el-Fåmene)*, kaj Neufchâteau *(Li Tchestea)*, ĉiuj en la Ardenoj.

Aspekto

Lingvofamilio

La valona distingas sin de aliaj lingvoj de oïl ĉar ĝi estas pli proksime al la Latina lingvo, sed aliflanke ricevis plej fortan influon de la ĝermanidaj lingvoj. Tion oni rimarkas en ĝia fonetiko, ĝia leksikono kaj ĝia gramatiko. La valona fonetiko estas eksterordinare konservativa: ĝi ne ŝanĝiĝis depost la Mezepoko.

Fonetiko kaj fonologio

- La latinaj [ka] kaj [g + e, i, a] donis al la valona afrikataj fonemoj literumitaj "tch" [ĉ] kaj "dj" [ĝ]: *vatche* (bovino), *djambe* (kruro).
- La latina [s] restis (dum en la franca ĝi ofte malaperis kaj iĝis ^): *spene* (dorno), *fistu* (pajlo), *mwaîsse* (mastro, komparu kun la franca *maître*), *fiesse* (festo, komparu kun la franca *fête*), chaestea (kastelo, france *château*),…
- Voĉaj konsonantoj fine de vortoj iĝas ĉiam senvoĉaj: *rodje* (ruĝa) estas prononcata ĝuste kiel *rotche* (roko).
- Nazalaj vokaloj povas esti sekvataj de nazalaj konsonantoj, kiel en *djonne* (juna), *crinme* (kremo), *mannet* (malpura), ktp.
- La vokala longo havas fonologian valoron. Ĝi ebligas distingi inter ekz. *cu* (pugo) kaj *cû* (kuirita), *i l' hosse* (li lulas ŝin) kaj *i l' hôsse* (li pliigas ĝin), *messe* (amaso) kaj *mêsse* (mastro) ktp.

Morfologio

- La pluralaj virinaj adjektivoj antaŭ substantivo ricevas neemfazitan finaĵon "-ès" (krom en la suda dialekto): komparu *li djaene foye* (la flava folio) kaj *les djaenès foyes* (la flavaj folioj).
- Mankas seksa diferenco en inter la difinita artikolo kaj la poseda pronomo (krom en la suda dialekto): komparu valone *li vweteure* (la aŭto, ina) kaj *li cir* (la ĉielo, maskla) kun la francaj *la voiture* sed *le ciel*; La valona havas *si coir* (lian/ŝian korpo, maskla) kaj *si finiesse* (lia/ŝia fenestro, ina) dum la franca havas *son corps* sed *sa fenêtre*.

Vortaro

Kiel dirite supre, la valona restis pli proksima al la latina ol la aliaj lingvoj de la oïl-familio. Tion oni vidas ankaŭ en la vortaro, ekz. la valona *dispierter* (vekiĝi) ekzistas en la hispana *despertar* (sama signifo) aŭ kaj la rumana *destepta* (sama signifo), sed la franca ne havas tian formon. Sed la plej frapa eco estas la kvanto

de pruntaĵoj el ĝermanidaj lingvoj (nederlanda, brabanta, germana, limburga): komparu la valonan *flåwe* al la hodiaŭa nederlanda *flauw* (malforta), la valonan *dringuele* (poŝmomo) kun la germana *Trinkgeld*, la valonan *crole* (buklo) kun la brabanta *krol*), la valonan *spiter* kun la brabanta *spieken*, la germana *spützen* aŭ la nederlanda *spuwen*), *li sprewe* (sturno) kun la nederlanda *spreeuw*.

Sintakso

Ankaŭ la sintakso estas pli ĝermaneca ol tiu de la franca lingvo. La adjektivo troviĝas ofte antaŭ la substantivo: komparu la valonan *on foirt ome* (forta viro) kun la franca *un homme fort* (viro forta); *ene blanke måjhon* (blanka domo) kaj la franca *une maison blanche* (domo blanka). La konstruo *Cwè çki c'est di ça po ene fleur?* (kia estas ĉi tiu floro?) povas esti komparata vorton post vorto kun la germana *Was ist das für eine Blume?*, nederlanda *Wat is dat voor een bloem?* kaj la norvega *Kva er det for ein blome?*

Ortografio

La valona lingvo ne konas la duoblan akcenton (nomitan *accent circonflexe* en la franca), kiu normale anstataŭas iun malnovan "s" (ekz. château de castellum). En la valona la "s" restis kiel en *test* (france: *tête*), *best* (france: *bête*), *maistr* (france: *maître*) ktp.[1]

Literaturo

La unuaj literaturaj tekstoj en la valona datumas de la 17-a kaj 18-a jarcentoj. Nu citu la kantojn de Hazert (kies vera nomo estis Mousset), la burleskajn operojn de Simon de Harlez, Cartier, Odon Fabry, Vivario kaj Hénault. En la 19-a jarcento kelkaj poetoj verkis valone, kiel Charles-Nicolas Simonon, Charles Duvivier kaj Nicolas Defrêcheux, kaj la teatra verkisto Edouard Remouchamps[2].

Esperanto

En Esperanto aperis la antologio *Valonaj poetoj: Antologieto*, eldonis *Editions du Furet*, 1993.

Specimeno: la Patro Nia

> *Vos, nosse Pere k' est la hôt,*
> *Ki vosse no soeye beni cint côps.*
> *Ki l' djoû vegne k' on vs ricnoxhe come mwaisse.*
> *K' on vs schoûte sol tere come å cir.*
> *Dinez nos ådjourdu li pwin po nosse djournêye.*
> *Fijhoz ene croes so tos nos petchîs*
> *Come nos l' fijhans eto so les petchîs dås ôtes.*
> *Ni nos leyîz nén tchair dins l' eveye di må fé*
> *Mins tchessîz li må lon erî di nozôtes.*

Vidu ankaŭ

- Le chant des Wallons

Eksteraj ligiloj

- france valone Valona gramatiko (http://users.skynet.be/lorint/croejh/index.html)
- france valone nederlande Retejo de la skribita valona (http://rifondou.walon.org/index-engl.html)
- france valone Fonetiko de la valona (http://users.skynet.be/lorint/croejh/node8.html)
- valone angle Walloon-English Gastronomy Dictionary (http://babel.lexilogos.com/walloon_gastronomy.htm)
- angle Ethnologue raporto pri la valona (http://www.ethnologue.com/show_language.asp?code=wln)
- valone L'Arsouye, valona retgazeto (http://www.arsouye.com)
- valone angle online dictionary (http://www.dicts.info/2/english-walloon.php)

Referencoj

1. ↑ Belga Antologio, valona parto, p. 19.
2. ↑ Belga Antologio, valona parto, p. 18.

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Valona_lingvo&oldid=5818658"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 09:26, 15 dec. 2015.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.